

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO

Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDAJ

ESPERANTISTES CATALANS!

Prepareu-vos a assistir el pròxim Congrés Català d'Esperanto al Vendrell, que tindrà lloc l'any vinent.

Per l'engrandiment del nostre moviment, envieu la vostra adhesió a la Federació Esperantista Catalana!

JULIO-AUGUSTO 1932

N-ROJ 184-185

Hi ha una manera indirecta de protegir a la
Federació Esperantista Catalana:

Comprar les coses que ella patrocina.

Kataluna Antologio

(segona edició)

Antologia de poetes i prosistes catalans en Esperanto. - 416 pàgines de text. - Preu: 10 pessetes.

Primer Manual de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto

Edició de 4.000 follets al preu de 25 cènts. exemplar. - Comandes des de 25 exemplars, 20 % de rebaixa.

Zamenhof-disko

Disc fonogràtic amb la veu del Mestre, impressionada amb motiu del 5.º Congrés Universal d'Esperanto a Barcelona en 1909.

L'únic disc al món que guarda la veu de l'autor de l'Esperanto.

Edició única de 50 discos!

Preu: 10 pessetes. - (Despeses d'embalatge i transport apart).

Adreceu-vos a _____

CARRER VALENCIA, 245. - - BARCELONA



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj

Enlande: 3 pesetoj

ADRESO:

València, 245-BARCELONA

EL CATALA I L'ESPERANTO

Per Madrid hi ha cada saviàs, que caieu de clatell tan bon punt obren la boca. Aquests homes diuen coses grans, d'acord, naturalment, amb llur alta mentalitat. Per això, quan diuen un disbarat, ho fan tal com correspon a llur categoria: no hi escatimen res.

Aquests saviassos, que arrosseguen al seu darrera una pila d'admiradors no tan savis, naturalment, quan obren la boca per parlar de l'idioma català, hi cauen amb les potes que de llei els pertoca, ni una més, ni una menys.

Fa temps que aguantem disbarat darrera disbarat, insolència darrera insolència, amb el bon fi d'arribar a un acord, de conservar l'harmonia, de consolidar la República, etc. Si com a català i per raons de tàctica política hom pot aguantar tanta llauana—perdoneu la vulgaritat—, com a esperantista tinc l'obligació de contestar certes al·lusions i males atribucions que tot argumentant pobrament en favor de la llengua de "la España imperial y castellana" han estat fetes a l'esperanto.

Temps enrera, a "Crisol", aquest senyor que signa Corpus Barga, parlant despectivament de l'aparició de "La Humanitat", deia entre altres coses no menys xocants:

"El señor Companys se acordará de cuando "L'Humanitat" era "L'Humanité". Parecía que la Humanidad iba a ser una. Una lengua, una patria para todos los hombres. "L'Humanité" propugnaba el esperanto; lo que no sospechó nunca se viera reducida a publicarse en un idioma entonces casi olvidado, como el catalán. Pero "L'Humanitat", por algo se llama así; debe tener la misma aspiración social que "L'Humanité" ha tenido siempre.

Aspira, sin duda, a que todos los hombres se entiendan. Si empieza por ayudar a dividirlos con un idioma más, es para unirlos luego mejor."

El senyor Barga demostra tenir una mentalitat molt baixa de sostre. Creu que els catalans d'esperit universal fan el ridícul si no se supediten al castellà, i per tal de donar millor suport al sofisme, ve a dir que els amics de la humanitat han de propugnar l'esperanto... i el castellà. No comprèn, no pot comprendre, que un esperantista ibèric pugui defensar un idioma que no sigui el de Castella. El senyor Barga creu que els partidaris de l'idioma internacional, per tal d'arribar a l'assoliment de llur ideal, han de començar per combatre els idiomes dels pobles petits. Amb això el senyor Barga ha bastit un argument fals i ens el vol fer passar com un axioma. Justament l'esperantista és l'home més respectuós amb els idiomes, per tal com és essència d'aquest moviment el respecte als parlars de tots els pobles, grans o petits. L'esperantista no necessita controlar si un idioma és oficial, regional o nacional; tots són considerats amb els mateixos drets. L'interessant és que tothom conegui l'idioma internacional neutral per tal de relacionar-se entre si els homes de pobles de parla diferent.

Sàpiga el senyor Barga que els esperantistes catalans es valen de l'esperanto quan es relacionen amb els companys de parla castellana. Dintre el camp creat pel doctor Zamenhof, no hi caben humiliacions, ni intoleràncies, ni esperits raquítics.

Saljo.

NOVES ADHESIONS

Continuen les adhesions a la nostra revista, que de mica en mica va guanyant el terreny perdut en els últims anys de la dictadura del general Primo de Rivera.

Darrerament ha ingressat a la llista dels nostres "Amics de Kataluna Esperantisto" el nostre incansable Director de la "Edona Fako de K. E. F.", En Jaume Grau Casas.

Vet ací una prova poc corrent de doble col·laboració a la nostra tasca esperantista, que ens dóna el capdavanter dels escriptors esperantistes de Catalunya.

- Darrerament ens han assabentat que el popular grup esperantista de la barriada del Poble Nou, ha acordat, en la seva darrera reunió general celebrada en el mes de Juliol, entrar de nou a la Federació Esperantista Catalana.

Saludem des d'aquestes planes els entusiastes companys del «Nova Sento», l'adhesió dels quals estimem moltíssim.

RAPORTO DE LA ĜENERALA KUNVENO DE K. E. F.

Dum la 22-a de Majo pasinta, okazis en la sidejo de K. E. F. la ĝenerala kunveno de nia Federacio, kun la ĉeesto de multnombra samideanaro el diversaj urboj de Katalunujo.

Sub la prezido de Sro. Alberich, oni komencas la kunsidon je la 11-a matene.

La sekretario legas la akton de la antaŭa ĝenerala kunveno kaj la kasisto la Bilancon 1931-32, kiuj estas unuanime aprobataj. Restas en la kaso, 57'45 pesetoj.

La sekretario Sro. Capdevila stariĝas kaj legas la sekvantan Sekretarian Raporton:

Karaj kunfederacianoj!

Malmulton novan ni povas diri al vi ĉe la legado de tiu ĉi sekretaria raporto, ĉar, precipe, ĉio interesinda por vi estis jam diskonigata pere de nia organo "Kataluna Esperantisto". Tamen, kelkaj paŝoj faritaj de tiu ĉi komitato restas ankoraŭ nekonitaj, tial ke ili rilatis al iuj klopodoj kiujn ni ne povis realigi, malgraŭ nia persisto kaj bonvolemo.

La laboro farita en la daŭro de la jaroj 1931-32, unuavide, povas sajni ne tiom grava ol tiu de la antaŭ jaro, sed ĝi, en ĉiuj aspektoj estas tiel granda kaj fruktodona kiel tiu lastenomita. Se dum 1930-31 oni starigis la tradician Federacion kaj oni reaperigis la malnovan organon "Kataluna Esperantisto", ni devos aldoni, ke dank' al komitato kiu finas sian laboron kaj ekziston ĉe tiu ĉi ĝenerala kunveno, la laboro komencita de la antaŭa komitato estas nun stabiligita por ĉiam, se ĝi ne suferas interrompon similan al tiu de Vinaroç. Do, kiel vi povos konstati, oni revigligis kaj stabiligis la ekziston de nia estimata "Kataluna Esperantista Federacio" nur en la daŭro de du jaroj, du jaroj plenplenaj de nevenkeblaj malfacilaĵoj ekonomiaj.

Tiu ĉi komitato faris la necesajn studojn por venigi en Barcelonon du konatajn esperantistojn, kiuj kaŭzis sensacion ĉe la vicoj de la esperanto-movado de Eŭropo, pro ilia konstanta inresigo al Esperanto de la neesperantista publiko. Certe vi divenos ke ni parolas pri la profesoro Andreo Ĉe kaj pri la usona samideano, kiu faris imitindan mondvojaĝon, Sro. Scherer.

Al Sro. Scherer ni nur povis oferi niajn servojn se okaze li findecidus viziti Barcelonon, kaj samtempe okazigi tie ĉi kelkajn el liaj tre interesaj paroladoj. Nia financa situacio ne permesis fari ion alian.

Rilate profesoron Ĉe, en la komenco ni havis la firman decidon kaj esperon venigi lin, sed neatenditaj malfacilaĵoj kaj la rapida elkuro de la tempo renversigis niajn klopodojn.

Por la organizado de la fankonataj kursoj Ĉe ni atingis la aprobon kaj subtenon de tiuj amikoj, kiuj multe kuraĝigas niajn

entreprenojn. Nur ni diru ke ili starigis garantian kapitalon, kiu sumis jam 900 pesetojn.

La ĉefa kaj sola kaŭzo, kiu decidigis nin halti, estis la manko de kunlaboro de la Universitato de Barcelona, al kiu ni petis, kaj certan aprobon ni prifidis, la cedon de unu el la tieaj aŭloj por okazigi la kursojn de Sro. Ĉe. Aliajn lokojn ni trovis, sed ĉiuj ne havis la adekvatan situacion kaj ĉambraranĝon, kaj plej multe el ili estis tro altpreza ĝia luado. Tamen ni ne malesperas, kaj ni profitos la oportunan momenton por venigi profesoron Ĉe, kaj la sperto jam atingita gvidos nin tra la sukcesa vojo.

En la antaŭa ĝenerala kunveno de KEF-anoj estis decidite sendi salutan leteron al Sro. Manuel Maynar el Zaragoza, kaj montri nian aprobon kaj oferi nian aliĝon pro liaj laboroj konstantaj por starigi tutlandan Konfederacion. Sro. Maynar, kiu diversfoje petis niajn opiniojn kaj sugestojn por la projektitaj regularoj de la nomita Konfederacio, invitis tiun ĉi komitaton al la partopreno de du kunsidoj, okazintaj en Zaragoza dum la 12-a kaj 13-a de Oktobro pasintjara. Ĉe tiu kunveno estis reprezentataj la aragona, astura, valencia kaj kataluna Federacioj, kiuj post nedaŭra diskutado starigis kaj aprobis la regularojn de "Hispana Esperantista Konfederacio". Ni ne dubis proponi nian kunlaboron al niaj nekatalunaj amikoj, kiuj ĉiam montris sin al ni kun plej sincera estimo kaj respekto. Tio montros al la ceteraj hispanaj esperantistoj, ke K. E. F. ĉiam havis je ilia dispono sian kunlaboron, kiun ni ne povis nei al tiuj, kiuj finfine komprenis ke Esperanto estas flanke de la ŝtato kaj forte ligita al la lingvo mem.

Ni konstatis kelkfoje, ke la nunaj aŭtoritatuloj diversfoje sin montris favoraj al nia afero, kaj ni skribis du petojn pri subvencio al nia Federacio. Unu al la Urbestro de Barcelona kaj alia al la registaro de Katalunujo. Ni havas privatajn referaĵojn pri tiuj subvencipetoj, kiuj, malgraŭ la ŝparemo de la oficialaj institucioj, igas nin esperi ian bonan rezulton.

"Kataluna Esperantista Federacio" skribis al ĉiuj grupoj, kiuj antaŭe apartenis al ĝi, kaj ĝis nun nun "Paco kaj Amo" aliĝis, sed kelkaj jam promesis baldaŭan eniron en nian Federacion, ĉar ili atendas ioman revigliĝon.

Rimarkindan sukceson ni havis ĉe la inaŭguro de Strato Dro. Zamenhof. De vi ĉiuj estas konataj la rezultatoj, kiujn ĝi alportis al ni, ĉar fine la Barcelona esperantistaro vidis sian sonĝon realigita. La posedo de unu strato je la memoro de la Majstro en Barcelono, estas grava paŝo por nia movado kataluna, tial, ke tiu sukceso multe favoros projektitajn entreprenojn de K. E. F.

Tro longa fariĝus tiu ĉi raporto se ni detale volus priskribi la tutan laboron faritan de tiu ĉi komitato. Ni diru, ke al nia organo "Kataluna Esperantisto" estas definitive certigita ĝia re-

gula aperado, kies financan niveligon ni ŝuldas al la tiel nomitaj "Amics de Kataluna Esperantisto", kiuj promesis pagi ĉiutrimonate DEK PESETOJN por garantii sendeficitan aperadon de tiu revuo. Ni devas, do, esti tre dankaj al tiuj 15 "Amics", kiuj donas nekutiman pruvon de fervoreco kaj estimo al nia malnova gazeto.

Ni finas tiun ĉi raporton esprimante al ĉiuj KEF-anoj plej koran dankon pro ilia valora subteno kaj kunlaboro, kaj ni speciale devas kuraĝigi niajn amikojn en Vendrell, por ke ili antaŭeniru nian K. E. F. per la organizo de la interrompitaj festoj kaj propagandoj depost la pasinta Kongreso de Vinaroç.

Eduard CAPDEVILA BUIL

Post la legado de tiu ĉi Sekretaria Raporto, kiu estas aplaŭde aprokata, oni priparolas la ĝeneralajn aferojn, kies diskutado donis la jenajn decidojn:

Oni akceptas proponon de Sro. Gili, kiu petas ke Kataluna Esperantista Federacio okazigu ĉe la nealiĝintaj grupoj propagandajn paroladojn pri la federaciigo de ĉiuj izolaj grupoj kaj individuoj.

Estas diskutata propono, kiu petas ke oni starigu komitaton por ke ĝi inaŭguru, kiel eble plej baldaŭ, esperanto-kurson ĉe radiostacio kaj prilaboru katalunlingvan vortaron kaj gramatikon de Esperanto. Sro. Alberich promesas, ke li post unu jaro estos eldoninta katalunlingvan esperanto-gramatikon. Sro. Dalmau diras, ke li estas preparanta Linguaphonmetodan esperanto-kurson por ĉi-tiea radiostacio.

Sro. Capdevila proponas al la kunsidantaj KEF-anoj, ke oni skribu al la Prezidanto de la Esperantista Akademio, Sro. Warden, petante al li, ke oni bonvolu prezenti Sron. Delfí Dalmau, ĉe la proksimaj balotadoj je Lingvo-komitatanoj, kiel anstaaŭanton de la plorata kataluna samideano Alfons Sabadell.

Laŭ propono de Sro. Solà, oni decidas denove kotizi al Konstanta Reprezentantaro.

La propono kiu estis fiksita en la tagordo, subskribita de Sro. Gili kaj aliaj samideanoj, pri okazigo de Universala Kongreso en Barcelono, estas unuanime akceptata, kaj oni decidas skribi al I. C. K. kun la peto, ke oni rezervu la jardaton 1935-an por Barcelono.

La finan parton de la tagordo konsistigas elektado de nova komitato. Sendiskute estis elektata la jenan estraron por 1932-33: Prezidanto, Sebastià Alberich; vicprezidanto, Joan Gili Norta; sekretario, Josep Alberich; vicsekretario, Vicens Andrés; kasisito, Jaume Herp; kalkulisto, Manuel Rodellar; bibliotekisto, Eduard Capdevila; voĉdonantoj, Jacint Comella kaj Josep Banet.

XVI-a KONGRESO DE K. E. F. KAJ XV-aj INTERNACIAJ
FLORAJ LUDOJ EN LA URBO VENDRELL.

Pentekosto de 1933

Fine ni povas anonci al niaj federacianoj kaj al niaj amikoj kaj simpatiantoj tiun ĉi ĝojigan sciigon.

Vendrell, unu el le plej gravaj urboj de Katalunujo, estos venontjare la scenejo de niaj festoj per- kaj poresperantaj. Ni danku niajn entuziasmajn samideanojn el Vendrell, kiuj, kvamkam jam tre malnovaj, ĉiam fervore batalis por nia afero en tiu urbo.

Preparu vin ĉeesti niajn XVI-an kaj XV-ajn!!!

ALVOKO AL LA XV-aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Al la esperantistaj verkistoj:

La Komitato de la XV-aj Internaciaj Floraj Ludoj vin salutas kaj invitas partopreni la jenajn konkursojn.

ORDINARAJ TEMOJ

Originalaj Tekstoj

- I. Originala versaĵo kantanta *Amon*.
- II. Originala *Ama* verko en prozo.

Tradukitaj Tekstoj

- I. Traduko de fragmento de la konata tragedio de Angel Guimerà, "Maro kaj Ĉielo" (Mar i Cel).
- II. Traduko de fragmento de la fama dramo de la sama aŭtoro, "En la Malsupra Lando" (Terra Baixa).

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. Premio de la Prezidanto de K. E. F., 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.
- II. Premio de la Estraro de K. E. F., 50 pesetoj. Temo. Laŭvola.
- III. Premio de "Kataluna Esperantisto". Dumviva abono al la gazeto. Temo: Kiel oni faras bonstilan tradukon.
- IV. Premio de la grupo "Barcelona Stelo", 50 pesetoj. Temo: Studo pri popolkantoj kaj popolkutimoj.
- V. Premio de la grupo "Paco kaj Amo", 50 pesetoj. Temo: Laŭvola.

Pliaj premioj kaj temoj sekvos en venontaj numeroj de Kataluna Esperantisto.

Inspiron al ĉiuj por la gloro de nia Literaturo!

La Juĝanta Komitato

La Prezidanto,
Artur Domènech.

La Sekretario
Jaume Grau Casas.

NOTOJ

I.—La aŭtoroj de la du premiitaj Originalaj tekstoj I-II, kaj tiuj de la du premiitaj Tradukitaj tekstoj I-II ricevos ekzempleron de "Kataluna Antologio" de Jaume Grau Casas, verko rekompencita de la Esperantista Akademio.

II.—Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinaraj premiitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti reĝinon de la Festo.

III.—La verkoj konkurantaj devas esti verkitaj en bona Esperanto, kaj ne ankoraŭ eldonitaj.

IV.—La solena Festo de la XV-aj Internaciaj Floraj Ludoj okazos en Vendrell dum la XVI-a Kongreso de "Kataluna Esperantista Federacio".

V.—La manuskriptoj, kiuj portos surskribitan devizon, devas esti ricevitaj antaŭ la 15 de Marto de 1933 ĉe la adreso de la Sekretario, Sro. Jaume Grau Casas, Ramon i Cajal, 33, *Sant Quintí de Mediona*, Katalunujo, kaj ili estos akompanataj de fermita koverto, kiu surhavas la saman devizon kaj entenos karton kun la nomo kaj adreso de la verkinto.

VI.—La verkoj premiitaj fariĝos propraĵo dum unu jaro de la Komitato de la Floraj Ludoj, kiu zorgos pri ilia publikigo sur "Kataluna Esperantisto" aŭ aliaj esperantaj gazetoj. Permeson por reprodukto dum tiu unua jaro oni devas peti al la Redakcio de K. E.

VII.—Eventuala aljuĝo de "Subpremioj" nur signifas honoran mencion sen rajto al efektiva premio.

PETO AL LA GAZETOJ.—Ni petas niajn kolegojn, ke ili publikigu nian alvokon por ke la konkurson partoprenu esperantistoj el la tuta mondo.

DUA LISTO DE VERKOJ PLENE TRADUKITAJ POR LA HISPANA ANTOLOGIO

Calderón de la Barca, La junulino de Gómez Arias; José Zorrilla, Orienta, La Sevilja delogisto kaj ŝtona gasto; Jacinto Benavente, La kreitaj profitoj; José de Elola (El Coronel Ignotus), La amo en la jaro dekmil; Fernández Ardavín, La ermenvestita sinjorino; Garcilaso de la Vega, Pensante pri rekteco de la vojo; Luis de Góngora, Al rozo; Fray Luis de Granada, Gvido de pekantoj; Marqués de Santillana, Kanzono; Fray Luis de León, La perfekta edzino; Antonio Machado, Portreto; Concha Espina, La sfinkso Maragata; Gabriel Miró, La ĉerizoj de l' tombejo; Ramón Pérez de Ayala, Dimanĉa lumo; Vicente Blasco Ibáñez, La kvar rajdantoj de la Apokalipso.

Ĉiuj gesamideanoj estas petataj sendi tradukaĵojn el la hispana lingvo al S-ro Jaume Grau Casas, Sant Quintí de Mediona, Katalunujo.

UNUAJ PASOJ DE ESPERANTO EN KATALUNUJO

Oni supozas, ke la unua esperantisto en Barcelona estis S-ro. Alfons Sabadell (ni diru, ke lia morto okazis antaŭ kelkaj monatoj) ĉe la fino de la jaro 1901. Lia nomo aperis, dum la 19^a de Marto de 1902, kiel korespondanto de la revuo "Esperanto", kiu estis en tiu tempo la propagandorgano de la internacia lingvo en la Iberia duoninsulo kaj latina Ameriko.

La unua esperantisto en Katalunujo estis S-ro. J. Vidal Llopart. En Vilanova i Geltrú li skribis artikolojn pri Esperanto por la revuo "Esperanto" de Santander, kies redaktoro li estis pli antaŭe ol S-ro. Sabadell.

En Decembro 1904-a estis fondita "Aplec Catalanista" en Ceret, kiu eldonis la bultenon "Espero de Katalunujo"; sur ĝi publikigis artikolojn, S-ro. Dalí, el Figueras kaj S-ro. E. Segarra, el Manresa; ĝia delegito en Barcelona estis S-ro Sabadell. Tiu bulteno publikigis la programon de la "Unua Ĝenerala Kunveno de Esperantistoj en Barcelona", kiu okazis dum la tagoj 24-25. de Septembro 1905; ĉeestis S-ro. Boirac, rektoro de Dijon' a Universitato; Th. Cart, Mlle. Florence, Mr. Berthélot; estis ludita la komedio "Supujo" ĉe "Centre Autonomista Fivaller", kaj oni interkunvenis en granda festeno en restoracio "Pompidor".

Ĉe la jaro 1905, la revuo "Filatélico" de Kataluna filatelia societo publikigadis esperantan fakon kun la klarigo de la reguloj kaj vortaron de Esperanto. En ĵurnalo "Joventut" de Barcelona, je la 22^a de junio samjara, numero 280, estis enpresita artikolo "Esperanto" de S-ro. Pujulà; tiu ĉi sinjoro diskonigis per numeroj 289-290 la raporton pri "La Unua Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne sur Mer", kies Delegito por la Kataluna Lingvo en la "Lingva Komitato" estis S-ro. Sabadell.

La 23-an de Septembro, ĵurnalo "Llevor" el St. Feliu de Guíxols anoncis du paroladojn pri Esperanto, kiuj estis klarigataj de S-roj. Pujulà kaj Sabadell. La unua disertaciis pri "Avantaĝoj de la lingvo internacia Esperanto", kaj S-ro. Sabadell pri "La Unua Universala Kongreso de Esperanto", kiun li ĉeestis kiel reprezentanto de Katalunujo.

En 1905, fondiĝis la esperantistaj grupoj "Verda ĉambro" en la sidejo de "Academia de Taquigrafía de Barcelona"; en Decembro, la societo "Espero Kataluna"; kaj "Grupo Esperantista de Barcelona" ĉe "Ateneu Enciclopèdic Popular".

En 1906, estis fondita esperantista grupo ĉe "Casino Republicano". Samjare, S-ro. Sabadell reprezentis "Grupo Esperantista de Barcelona" kaj "Akademio de Sabadell" dum la Dua Universala Kongreso de Esperanto en Ĝenevo. Ankaŭ aperis en Barcelono la "Kataluna Gramatiko de Internacia Lingvo Esperanto" de F. Pujulà.

En 1908, S-ro. Sabadell aperigis "La Patrino" kaj "Cikadoj kaj

Formikoj". Dum tiu jaro aperis: "¿Quiere Vd. hablar el Esperanto?" kaj "Gramatiko Esperanto" de la advokato D. José Garzón. "Curs pràctic", "Kolekto Pujalà" kaj "Vortaro Esperanto-Kataluna" de S-ro. Pujalà. En Septembro, estis anoncita, ke la 5.^a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Barcelona. La moŝta ordeno "Missioners del Cor de Maria", enkondukis Esperanton kiel oficialan esprimilon ĉe ĝiaj instruprogramoj. En Vilasar de Mar, ekembriiĝis en tiu jaro "Esperantista Federacio de Katalunujo."

MANUEL RODELLAR (*Finota*)

BALANÇ DE COMPTES DE LA PLACA DEL CARRER DEL DR. ZAMENHOF I DE LA FESTA D'INAUGURACIO

Llista de subscripcions.—Federació Esperantista Catalana, pesetes 50; Grup Paco kaj Amo (llista oberta als seus socis), pesetes 50; Barcelona Stelo, 79; Nova Sento, 10'40; Juneco, 8'30; Enciklopedia Akademio Esperanto, 12; Esperanto-Fako de l'Ateneu Enciclopèdic Popular, 12; Esperantista Ligo de Fervojistoj, 5; Zamenhof Instituto, 10; Alumnès d'Esperanto a La Violeta de Clavé, 10; Recaptat en la Festa del Llibre Esperantista, 5'20; Dr. J. Bremon, 5; J. Herp, 5; Dr. Torres Carreras, 5; Dr. M. Orriols, 15; F. Soler Valls, 10; A. Codorniu, 10; J. Paluzie, 10; J. Aubeyzon, 5; M. Ferran d'Aubeyzon, 5; benefico obtingut amb l'organizació de la festa, 76'30; defició que ha estat eixugat per un samideano, 3'90. *Total ingressos: 402'10 pesetes.*

Despeses.—Esculpir la placa de marbre pel nostre samideano J. Barba, 175 ptes.; efígie del Mestre en bronze, i claus del mateix metall, 59; clixés, gravats, fotografies, etc., 19'55; despeses d'organizació, propines, etc., 109'05; impressos, 33; correspondència, 6'10. *Total despeses, 402'10 pesetes.*

Nota.—Els comprovants d'aquestes sumes estan a disposició dels qui les demanin.

Pel Comitè d'Organizació, Joan GILI NORTA.

Barcelona, 20 d'abril de 1932.

Una felicitació de la Filla del Dr. Zamenhof.

Varsovio, la 7-an de Majo de 1932.

Sro. Joan Gili Norta.

Barcelona

Tre estimata samideano:

Koran dankon por via tiel ĝojiga letero de la 14-a de Aprilo. Kun granda ĝojo mi legis pri la inaŭguro de Zamenhof-strato en Barcelona kaj rigardis la bildon de la memortabulo. Mi esperas, ke tiu ĉi sukceso komencos en via urbo epokon de nova intereso al Esperanto, simile kiel estis en Varsovio.

Koran gratulon al Kataluna Esperantista Federacio!

Kun samideanaj salutoj, Lidya Zamenhof.

BIBLIOGRAFIO

Streĉita kordo, poemoj de K. Kalocsay. Eldonis: "Literatura Mondo", Budapest, 1931.

Lukse eldonita libro, kun ducent paĝoj, vera juvelo, unu el la plej valoraj verkoj en Esperanto.

Kalocsay povas esti inde komparata je iu granda nacia poeto. Li ne estas diletanto, juna enamiĝinto kiu simple elverŝas le sentojn de sia koro, sed alta spirito kiu havas ion por diri kaj feliĉe por ni diras ĝin en Esperanto. Kalocsay posedas rafinitan kulturon, kiu brilas en ĉiu lia poemo.

En "Streĉita kordo" abundas la veraj perloj, kvankam la *manner* ĉe la multegaj poemoj estas tre diversa. "Ni laŭdu lin..." sentigas la ĉagrenon pri la morto de Zamenhof. "En amara koro" juste vipas la neseriozajn esperantistojn. "Th. Cart mortis..." estas kortuŝa nekrologo al la genia prezidinto de nia Akademio. "Kanto de vagabondo", tre bela, ŝajnas prenita el la poemoj de lia kolego kaj samlandano Baghy. "Ridu kara" estas delikata voko al la amatino. "Maja idilio" estas dolĉe romantika. "Kisoj" estas unika peco, meritinta la Naturan Floron ĉe niaj Floraj Ludoj en Vic. "Tri benoj" estas treege inspirita kaj perfekta je formo, poemo el tiuj, kiuj igas poeton senmorta. "Rustas la plumo" estas madrigalo milda kaj samtempe pasia, ĉar la poeto preferas skribi, pli ol sur papero per aĉa inko,

sur neĝo de ŝiaj ŝultroj brilaj
per fajro de lipoj maltrankvilaj.

Kvar sonetoj, formo de poezio al kiu nia ŝatata poeto tre inklinas, titolitaj "Printempo", "Somero", "Aŭtuno" kaj "Vintro", daŭrigas tiun aron da floroj, kiuj pro sia speciala aromo, haltigas nin pli longe ol kutime dum nia promeno tra la pompa ĝardeno, kia estas la poezio de la hungara Kalocsay. "En la memorlibron de knabino", riĉa je poeziaj bildoj, plaĉas kaj sonas kiel neriproĉinda soneto. La du poemetoj "Familiopatro" kaj "Maljuna fraŭlo" spiras vivan humoron, melankolion. Senĉese fluas beleco el tiu verko de Kalocsay...

Nur mi permesas al mi diri, ke kelkaj ŝanĝitaj pensoj aŭ frazoj, ŝanĝitaj ĉe la apero de la Kalocsay-poemoj en libra formo, ne tiom plaĉis al mi kiom la primitivaj formoj aperintaj en gazetoj. Sed eble tio okazas ĉar mi sciis parkere multajn el la poemoj de nia admirata amiko, kaj mi spertas la embarason de konservativulo antaŭ novaĵoj... Plie, estas vero ke multaj personoj ŝatas pejzaĝon, nur en tiu lumo, en kiu ĝi unuafoje estas vidita.

En la lando de Hindenburg, de Larissa Reissner. Vojaĝo tra la germana Respubliko en 1924. Eldonis "Ekrelo", Lobauerstr., 31, Leipzig-N. 24. Tradukita el la germana, de W. Kampfrad kaj W. Krey. Libreto 80-paĝa. Prezo: 0'80 gmk.

Kun intereso oni legas "Ullstein", rakonto pri domo kie estas

farataj kelkaj grandaj ĵurnaloj germanlingvaj; "Junkers", alia rakonto pri la fama fabriko de aeroplanoj; "En la koncentrigejo de la malriĉeco", kruda priskribo de mizeraj scenoj, el kiu elstaras "Pantofloj"; "Krupp kaj Enen", rilatanta la kanon-fabrikejon. Vere tipaj vidaĵoj de la germana lando post la mondmilito.

J. G. C.

Septembro, poemo de Geo Milev. El la bulgara lingvo kolektive trad. SA-MA. Eldono de *Ekrelo*, Leipzig. Kajero 32-paĝa, 16 1/2 x 12 cm., prezo 0'20 gmk.

Per krudaj vortoj kaj malvestita ornamriĉeco la poemo *Septembro* prikantas travivitajn tagojn dum plensanga revolucio.

Por la latina leganto, kutiminta legi poeziojn kun malmulte da silabmezuraj ŝanĝoj, *Septembro* estos, je la komenco, iomete nekomprenebla, ĉar laŭmezuraj versoj ne ekzistas. Ĉiu vorto, penso, bildo, aŭ frazo, kiu havas ĉe si mem la tutan emocion, formas apartan verson.

La lingvaĵo malmulte sukcesis en tiu ĉi traduko, kiun ni konsideras tre malfacila por ne lertaj esperantistoj. Kelkaj partoj de la poemo estas iom konfuzaj. Abundas poetikaj esprimoj preskaŭ nedeĉifreblaj: "purpur-koler; vizaĝ-malflataj; kolera frukt' de storma vol' ". Ankaŭ englitiĝis kelkaj forigindaj neologismoj, kaj neakceptebla estas la vorto "tutĉiuj"; ankaŭ meritas la saman premion la uzo de / kun apostrofo ĉe la komenco de verso kaj antaŭ konsonanto.

El la kolektivaj tradukintoj, nur elstaras pro ilia lerta kaj klara traduko, la kamaradoj kiuj zorgis pri la 4-a kaj 12-a numeroj de la poemo. La aliaj ne tiom sukcesis.

Edca.

REVUO DE REVUOJ

Esperantistul, trimonata esperanto-aldono al rumana semajngazeto "Marea Noastra". Redakcio kaj administracio: strada Scarlet. n. 67, Constanta, Rumanujo.

Espero Katolika, organo de I. K. U. E. Monata gazeto. Direktoro, pastro Font Giralt. Redakcio kaj administracio: Collell (Banyoles-Girona), Katalunujo.

La Nova Epoko, literatura-arta-sciencia dumonata revuo de la S. A. T.-organizo. Abono, 2'50 gmk., 15 fr. frk. aŭ egalvaloro. Administracio: Kolmstr., 1, Leipzig-O-27, Germanujo.

Nia Vivo, monata bulteno de espta. grupo "Frateco". Direktoro, Emilio Bruquetas. Redakcio kaj administracio: Roda, 14-16, Zaragoza, Hispanujo.

Norvega Esperantisto, monata organo de Norvega Esperantista Ligo. Abono, 3 norv. kr. por eksterlando. Redakcio: Bergsliensgt., 11, Oslo, Norvegujo.

Progreso Esperantista, informa bulteno de Hispana Esperantista Konfederacio. Redakcio: Roda, 14-16, Zaragoza, Hispanujo.

ENLANDA KRONIKO

Barcelona.—La grupo "Barcelona Esperantisto", okaze de la inaŭguro de esperanto-kurso, invitis Sron. Delfi Dalmau paroladi ĉe la malfermo de la organizita kurso. Nia amiko Dalmau faris interesan priskribon pri la ĵus okazinta Lingva Konferenco en Arnhem, kaj konstatis al la aŭdantaro la paceman spiriton de la esperantistoj, kiuj malgraŭ ilia malsama nacieco komprenas kaj eĉ rifuzas la lingvajn altrudojn de iliaj propaj ŝtatoj.

— Kiel ni anoncis en la pasinta numero de "Kataluna Esperantisto", okazis en la belega arbaro Güell la Printempa Esperanta Festo, kiun, kiel ĉiujare, organizis la malnova grupo "Paco kaj Amo". Ĉeestis al tiu altira loko ĉirkaŭ 350 esperantistoj el la Barcelonaj grupoj.

Dum la mateno okazis diversaj sportludoj, kaj du piedpilkaj ekipoj de esperantistaj grupoj ludis belan "match". Posttagmeze estis dediĉata la tuta tempo al literatura festo, ĉe kies fino la prezidanto de "Kataluna Esperantista Federacio", Sro. Sebastia Alberich faris kelkminutan disertacion pri la neceso ke ĉiuj lokaj grupoj ariĝu sub nia kara K. E. F., kun la celo doni al nia enlanda movado pli efektivan kaj celkonscian agadon.

— En la kvartalo "Verdum", apud Sant Andreu de Palomar, fondiĝis nova grupo, kiu jam klarigas esperanto-kurson de post kelkaj semajnoj. "Esperanta Grupo Frateco" estas la nomo de la raportita grupo, kies kreon ni ŝuldas al kelkaj samideanoj de la iama grupo "Esperanto kaj Patrujo" kaj al fervora samideano Joan Asturgo. Bonvenon al la nova grupo!

— Estas anoncata esperanto-kurso en la Labora Universitato, sub la gvido de la sekretario de "Barcelona Stelo", Sro. Ramon Moret. La kurso estas organizata sub la patronato de la konata "Institut d'Alumnes i Ex-alumnes de l'Escola del Treball".

Mallorca.—La ĉiutaga ĵurnalo "La Ultima Hora" publikigas ĉiun sabaton tre interesan esperanto-rubrikon en hispana lingvo. Ni ŝuldas tiun ĉi taskon al la fervora tiea samideano, Sro. Fernando Redondo.

NEKROLOGO

Mortis en Essen (Germanujo) dum la pasinta monato Aprilo, la konata kaj eminenta germana esperantisto Friedrich Pillath. Lingvo-komitatano kaj bonega tradukinto de la Heine-poemoj.

Li estis kunlaboranto de "Literatura Mondo" kaj "Heroldo de Esperanto" (tiam E. T.), kie li uzis la konatan pseŭdonimon *Zanoni*.

Ripozu en paco la eminenta pioniro!

Eesperantistes de parla catalana:

Ens cal la vostra col·laboració per mantenir l'estructuració actual del moviment esperantista.

Adheriu-vos, doncs, a la

Federació Esperantista Catalana

i a la vegada feu-vos abonat del seu òrgan oficial

Kataluna Esperantisto

Per a ésser soci de la Federació cal pagar la següent quota:
1'80 pessetes a l'any els federats que pertanyin a un grup esperantista organitzat.

3'10 pessetes a l'any els isolats. (Individus no agrupats).

Subscripció a la revista Kataluna Esperantisto val 3 pessetes a la Península i 4 pessetes per a l'estranger.

Envieu l'import de les quotes per gir-postal o en segells de correus a l'adreça de la Fed. Espta. Catalana:

Carrer València, 245. - - Barcelona

FOTO - AMATOROJ

ATENTU!

Ni volas korespondi kaj interŝanĝi aktualajn foto-bildojn kun gekamaradoj de Hispanujo.

Skribu multnombre.

Respondo estas garantiata!
"MUNCHENA FOTO-ASOCIO"

Turnu vin al:

JOSEF ZEILHOFER

Ringseisstr., 4/II. G. H. MUNCHEN (Germanujo)

JAUME GRAU CASAS

SANT QUINTÍ DE MEDIONA (Katalunujo)

Vendas sian Esperanto - Bibliotekon,
konsistantan el
400 volumoj

Estas interesaj novaĵoj kaj malnovaĵoj. Inter la lastaj, plena kolekto de "LA REVUO". (Ok binditaj volumoj).

Interesatoj petu prezojn!